

KAMPULO IRIS POR SEMI – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Mateo 13,1-23

En tiu tago Jesuo eliris el la domo kaj sidiĝis apud la lagobordo, kaj kolektiĝis ĉirkaŭ Li tiel granda popolamaso, ke Li suriris ŝipeton, kaj tie Li sidiĝis, dum la tuta popolo restadis ĉe la bordo. Kaj Li multe parolis al ili per paraboloj, dirante: "Iu kampulo iris por semi. Dum la semado, iuj semoj falis apud la vojo; kaj la birdoj venis kaj formanĝis ilin. Aliaj falis sur ŝtonplenan lokon, kie ili ne havis multe da tero. Tuj ili ekkreskis, ĉar ili ne povis enprofundiĝi. Sed kiam la suno leviĝis, ĉar ili ne havis profundajn radikojn, ili forvelkis kaj brulsekiĝis. Aliaj falis inter dornarbustoj. Ĉi tiuj kreskis kaj sufokis la ĝermintajn semojn. Sed aliaj falis sur la bonan teron, kaj donis abundan frukton centoblan, sesdekoblan, tridekoblan. Kiu havas orelojn, tiu aŭdu". Tiam la disĉiploj alproksimiĝis al Jesuo, dirante: "Kial Vi parolas al ili per paraboloj?". Li respondis: "Ĉar al vi, simpluloj, Dio rivelas la misterojn de la regno de la ĉielo, sed al ili ne. Tiel al tiu, kiu havas ion, estos aldonate eĉ pli; sed al tiu, kiu ne havas, estos forprenata eĉ tio, kion li havas. Pro tio Mi parolas al ili per paraboloj, tiel ke ili rigardas, sed ne vidas; ili aŭskultas, sed ne komprenas.

Por ili plenumiĝas tiu profetaĵo, kiu estas en la libro de Jesaja: ,Vi aŭdos, sed vi ne komprenos; vi rigardos, sed vi ne vidos. Ĉar la koro de ĉi tiu popolo obstiniĝis, iliaj oreloj eksurdiĝis. Ili fermas siajn okulojn por ne vidi; ili ne aŭdas per siaj oreloj, nek komprenas per sia koro; pro tio ili ne konvertiĝas kaj Mi ne povas resanigi ilin.'

Sed vi estas beataj, ĉar viaj okuloj vidas, kaj viaj oreloj aŭdas. Vere Mi diras al vi, ke multaj profetoj kaj justuloj deziris vidi tion,

kion vi vidas, sed ili ne vidis, kaj aŭdi tion, kion vi aŭdas, sed ili ne aŭdis”.

Poste Jesuo diris: “Aŭskultu do la signifon de la parabolo pri la semanto. Tiuj, kiuj aŭdas la vorton de la regno kaj ne komprenas ĝin estas kiel la strato: venas la malbonulo kaj forprenas tion, kio estis semita en lia koro. Aliaj estas kiel ŝtonplena tero. Ili aŭskultas, ja, la vorton, kaj tuj ili akceptas ĝoje ĝin; sed ili estas malkonstantaj, ili ne donas al la vorto eblecon enradikiĝi. Kiam venas suferoj aŭ persekutoj pro la dia vorto, tuj ili senkuraĝiĝas. Aliaj estas kiel tero rubusplena: ili aŭdas la vorton de Dio, sed la zorgoj de la mondo, la volupto kaj trompo de riĉeco sufokas la vorton de Dio, kaj ĝi fariĝas senfrukta. Fine, kelkaj estas kiel la bona grundo; ili komprenas kaj fruktigas ĝin; kaj la dia vorto produktas centoble, sesdekoble, aŭ tridekoble”.

La parabolo de la semanto kiun ni trovas en la ĉapitro 13 de la evangelio de Mateo ne volas esti invito ekzameni sin mem, sed kuraĝigon al la disĉiploj anoncadi la evangelion. Se oni fiaskas en tri grundoj, en la kvara la abunda rikolto repagas ĉiujn malgajnojn. Kial? Jesuo fidas en la povo de la krea vorto.

La parolo de Jesuo estas la sama parolo de tiu Dio kiu diris: “*Estu la lumo kaj la lumo estis*”. Tiu Dio kiu ĉe profeto Jesaja certigas: “*Tiel estos pri mia parolo elirinta el mia buŝo: ĝi ne revenos al mi senefike, sen prilaboro de tio kion mi deziras kaj sen plenumo de tio pro kio mi ĝin sendis.*” Tiu estas la forto de la mesaĝo de Jesuo.

Lia parolo do enhavas en si tioman energion, tioman kreivan potencon, ke, kiam ĝi estas akceptita, ĝi liberigas sian tutan potencon. Jesuo do esprimas tion per paraboloj. Kial li ĝin esprimas per paraboloj? Al la disĉiploj kiujn li iniciatis “*al la misteroj de la regno de la ĉieloj*” kio estas tiuj misteroj?

La misteroj estas sekreta kono. Kaj kiu estas la sekreta kono de la regno de la ĉielo? Ke la amo de Dio estas universala.

La amo de Dio ne havas preferatan popolon aŭ popolparton privilegian. La amo de Dio estas universala. Sed tion oni ne povas diri al la popolo. La popolo, trempita per nacia ideologio, estus rifuzinta Jesuon, samkiam en la evangelio de Luko Jesuo klopodis proponi tion al Nazareto kaj li malfacile evitas linĉadon.

Jesuo do parolas al la homoj per paraboloj, tiel ke tiu kiu agordiĝas povas kompreni; por la aliaj tiu estos penso kiun ili devos poste maturigi.

Kaj Jesuo proponas tiun ĉi parabolon de la semanto kaj estas Jesuo mem kiu ĝin komentas, ni do nin limigos substreki lian komenton. *“Dum la semado, iuj semoj falis apud la vojo; kaj la birdoj venis kaj formanĝis ilin”*. Ĉi tie do estas parto de la semoj kiuj, tuj post la falo, estas forportita. Parto do kiu ne burĝonos.

Kaj Jesuo mem komentos: *“Tiuĵ, kiuj aŭdas la vorton de la regno kaj ne komprenas ĝin...”* ĉar por kompreni tiun vorton necesas la konvertiĝo. Samkiel en la peco de ĉapitro 6, versikloj 9-10, kiun Jesuo citis laŭlonge de tiu ĉi parabolo, kiam profeto Jesajo kunpuŝiĝas kun la nekomprenemo de la popolo, kaj ĝi finiĝis per *“ili ne komprenas per sia koro; pro tio ili ne konvertiĝas kaj Mi ne povas resanigi ilin”*.

Por kompreni la vorton de la Sinjoro necesas konvertiĝo kaj la konvertiĝo en la evangelio de Mateo estas meti la bonon de la homo je la unua loko kiel absolutan valoron. Nu, diras Jesuo, *“Tiuĵ, kiuj aŭdas la vorton de la regno kaj ne komprenas ĝin”, ĝuste ĉar mankas la konvertiĝo,“ venas la malbonulo kaj forprenas tion, kio estis semita en lia koro. Tiu estas la semo dissemata laŭlonge de la strato”*.

La malbonulo estas la bildo de la povo, de la ambicio. Tiuĵ personoj estas tute rezistaj aŭ malfavoraj al la vorto de la Sinjoro, ĝin ili eĉ vidas kiel minacon al propraj interesoĵ. Totala fiasko do; en la unua ĝi eĉ ne burĝonas.

“Aliaĵ falis sur ŝtonplenan lokon, kie ili ne havis multe da tero. Tuj ili ekkreskis, ĉar ili ne povis enprofundiĝi. Sed kiam la suno leviĝis, ĉar ili ne havis profundajn radikojn, ili forvelkis kaj brulsekigiĝis”. La efiko de la suno sur la planton estis bonfara, ĝi estas tio kiu ĝin fortigas kaj kreskigas. Ĉi tie male ĝi estis brulsekigita. Se la kulpo ne estas de la suno, la kulpo estas de

la planto, eĉ de la tero, ĉar pro tio ke ĝi estas ŝtonplena, la planto ne povis enradikiĝi kaj sekiĝis.

Do en la unua ĝi ne burĝonas kaj en la dua ĝi ekaperas, sed tuj brulsekiĝas. Kaj estas Jesuo mem kiu komentas: *"Tio kio estis semata sur la ŝtonplenan teron, estas tiu kiu aŭskultas, ja, la parolon, kaj tuj ili akceptas ĝoje"*, la entuziasmoj do pri tiu ĉi mesaĝo, kiuj vidas en la parolo de Jesuo respondon al propra deziro de vivpleneco, sed *"ili ne havas en si radikojn"*, tio estas la parolo ne enradikiĝas en la personon, ne eniras ĝin, ne transformas ĝin. La parolo de Dio devas esti akceptata kaj, post la akcepto, ĝi liberigas ĉiujn siajn kapablojn kiuj transformas la individuon.

Se ne estas tio, *"Kiam venas suferoj aŭ persekutoj..."*. Sed Jesuo proklamis beataj la persekutitojn! Estas evidente ke anonci ĉi tiun amomesaĝon iras kontraŭ la interesoj de la mondo kiu vivas sur la povo kaj estas normale ke estu nekomprenejo aŭ persekutado pro la parolo. Kaj Jesuo diras: *"Tuj ili senkuraĝiĝas."* Laŭvorte ili skandaliĝas, tio estas stumblas. Tiu entuziasmoplenaj personoj do kiuj pensas ke sekvi Jesuon estas iri renkonte al aplaŭdoj, al rekonaj, kiam ili vidas male ke oni iras renkonte al nekomprenejoj kaj persekutoj, disfalas.

Jesuo daŭrigas: *"Aliaj falis inter dornarbustoj. Ĉi tiuj kreskis kaj sufokis la ĝermintajn semojn"*. En tiu ĉi kazo la tero estas bona, sed ĝi estis tero kie ankaŭ estis dornoj. Kreskadis la planto, kreskadis la dornoj kaj ili ĝin sufokis. Kaj komentas Jesuo: *"Aliaj estas kiel tero rubusplena: ili aŭdas la vorton de Dio, sed la zorgoj de la mondo, la volupto kaj trompo de riĉeco sufokas la vorton de Dio, kaj ĝi fariĝas senfrukta"*.

Kion tio signifas? La zorgoj de la mondo vidigas en la mono kaj en la riĉeco sian solvon. Nu kiam oni sukcesas atingi tiun riĉecon, tiun monon, tio tamen tuj poste ekestigas novajn ambiciojn, novajn dezirojn, novajn bezonojn, kaj tio igas nin ree meze de ekonomiaj zorgoj, vidante en la mono ankoraŭfoje la solvon.

Persono do kiu ĉiam zorgas pri la ekonomio, persono kiu ĉiam kaj ekskluzive pensas pri si, kiel tiu povas pensi pri la aliaj? Pro tio li sufokas la parolon. En ĉi tiu kazo la tragedio estas ke la tero estas bona, ĝi produktas, la persono tamen ne elradikigis la malbonan planton de la ambicio, de la riĉeco. Por Jesuo la valoro de la persono konsistas en ties malavareco, kaj iu individuo kiu estas ĉiam zorganta pri si kompreneble ne povas esti malavara.

Fine Jesuo diras: *"Sed aliaj falis sur la bonan teron, kaj donis abundan frukton"*. En la unua do ĝi ne burĝonas, en la dua ekaperas kaj sekiĝas, en la tria kreskas kaj sufokiĝas, ĉi tie male en la bona tero ĝi liberigas siajn tutajn energiojn *"kaj donis frukton centoblan, sesdekoblan, tridekoblan"*.

En la tempo de Jesuo, en la tiuepoka kulturo, kiam el iu grenero naskiĝis spiko kun dek aŭ dektri grajnoj, tio estis konsiderata bona rikolto, ĉar la meza kvanto estis de sep, aŭ ok grajnoj. Dum eksterordinaraj jaroj oni eĉ havis spikon kun tridek grajnoj. Nu, tion kiu estas ekcepto, la abundo, Jesuo metas ĉefine.

Jesuo diras ke ĝi donos frukton centoblan, sesdekoblan aŭ tridekoblan. Li ne komencas je tridekobla kaj poste sesdekobla kaj centobla. Tion kio jam estas eksterordinara Jesuo metas ĉefine. Komence male li metas la centoblan. Kiam estas la konvertiĝo kaj oni akceptas tiun vorton sen meti al ĝi ajnan limon, la parolo liberigas sian kreivan energion kaj transformiĝas en benon. La nombro cent en la Biblio estas bildigo de beno.

La parolo eniras en la individuon, lin transformas, la individuo mem iĝas tiu parolo, kaj lia ekzisto estas beno por tiuj kiujn li aliras.